**komunikoj**

JARO 34-a | APRILO - MAJO - JUNIO | N-ro 138 2010

"Amu vian Dion
per via tuta animo
kaj vian proksimulon
kiel vin mem."

Jesuo

**Naskiĝi, morti, renaskiĝi ankoraŭ kaj ĉiam progresi tia estas la leĝo.**

# 3ª BRAZILA KONGRESO DE SPIRITISMO



De la 16ª ĝis la 18ª de Aprilo, brazilaj kaj eksterlandaj spiritistoj kunvenis en la ĉefurbo Braziljo por festi, en brila Kongreso, la centjaran datrevenon de naskiĝo de la karmemora, tre amata mediumo Franĉjo Ŝavjer (Chico Xavier).

Inter ĝiaj plej belaj fruktoj ja elstaris la konstanta elvokado kaj sekva plifortigado de la streĉa ligiteco inter Evangelio kaj Spiritismo, kiun Franĉjo elmontradis dum sia vivo tute dediĉita al semado de paco, frateco, amo, unuvorte al BONO.

La ĉeesto de nia kara, komuna lingvo Esperanto estis ĉiutaga, en ĉiuj momentoj de la evento, dank' al la funkciado de stando por informado pri la lingvo, ties idealoj kaj ties fruktoj en la konstruado de interhoma frateco super ĉiuj baroj kaj diferencoj.

La konstantaj deĵorantoj, inter ili la amata, internacie konata paro Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, ricevis de la vizitantoj aliĝojn, promesojn de kunlaborado, faris kontaktojn kun respektegindaj anoj de la spiritisma movado, kiuj al ĉiuj portis sian apogon, sian instigon al plua, senĉesa poresperanta laborado, kaj ĉiam ĝojis pro la renkontiĝo, en la standa "teritorio", de adeptoj, kiuj ankoraŭ ne havis la okazon por persona konatiĝo.

En la stando funkciis eta ekspozicio de diversaj verkoj, en Esperanto, pri Spiritismo, por lernado de la lingvo, kaj estis disdonataj centoj da presaĵoj, inter ili la fama mesaĝo "La Misio de Esperanto", de la Spirito Emmanuel, psikografie skribita de Franĉjo Ŝavjer.

Nia Dia Majstro ja zorge flegos ĉiujn semojn tie disĵetitajn!

Raportaĵo de Affonso Soares



Fratoj, silentu! Ne parolu, se ne estas bezono. La vana parolo foje vundas la senton de la alparolanto. Kiam vi bezonas paroli, faru tion tre atente, malrapide, por elekti la ĝustajn parolojn. Kontrolu tion, se la paroloj venas el la koro, plenaj de amo. Se ne okazas tiel, estas preferinde silenti. La silento ofte parolas pli laŭte ol la eldirita parolo. Estu via parolo ĉiam konstrua, konsila, helpa, fortiga. Oni instruu la infanojn kaj servistojn per ago, prefere ol per parolo. Sed la ago ankaŭ estu diktita de la koro. Neniam estu en via koro malamo kaj venĝemo. Estu ĉiam positiva, sed dolĉa kaj milda.

Mediumo: Délio Pereira de Souza
Spirito: Esperantisto

# J. B. MELLO E SOUZA

Naskiĝis en Keluz – SP
28 – Majo – 1888

Mortis en Rio-de-Ĵanejro - RJ
27 – Aŭgusto – 1969

Li vivadis dum 81 jaroj kaj 3 monatoj

João Baptista Mello e Souza estis unu el la valoraj pioniroj de Esperanto en Brazilo. Li diplomiĝis pri Juro kaj estis fama oratoro, verkisto, poeto kaj tradukanto de brazilaj poeziaĵoj en Esperanto. Li faris sennombrajn prelegojn pri nia lingvo. Li estis (en 1909) membro de la Estraro de Brazila Esperanto-Ligo (1ª Sekretario) kaj redaktoro de "Brazila Esperantisto", en kiu li aperigis diversajn liajn poeziojn kaj artikolojn.

Li estis membro kaj Prezidanto, dum multaj jaroj, de "Brazila Klubo de Esperanto" – RJ. De la 14ª ĝis la 20ª de aŭgusto 1910 li estis en la VI Internacia Kongreso de Esperanto en Washinton-Usono, kiel oficiala reprezentanto de la Brazila Registaro kaj de BEL. Je la 17ª de aŭgusto, sub la prezidanteco de D-ro Zamenhof, estis disdonitaj la premiojn al la gajnintoj de la 2ª Kongresa Literatura Konkurso. La 1ª premio por poezio estis aljuĝita al nia J. B. Mello e Souza (kun 21 jaroj), pro lia poezio: "La Universala Frateco". Li estis unu el la malmultaj brazilanoj, kiuj havis la honoron kaj plezuron koni persone kaj interparoli kun D-ro Zamenhof.

Mello e Souza reprezentis BEL en la 37ª Universala Kongreso de Esperanto en Oslo – Norvegio – 1952. Li estis profesoro pri Historio de Ameriko, kaj pri la portugala lingvo. Li estis Direktoro de Colégio Pedro II (suda sekcio). Li instruis ankaŭ ĉe Universitato de Ŝtato Guanabaro, Fakultato de Filozofio Sankta Ursolino kaj ĉe Lernejo Mello e Souza, kiun li fondis kaj direktoris.



J. B. Mello e Souza

Multfoje oni konfuzis lin kun lia frato, la profesoro pri matematiko kaj fama verkisto Júlio César Mello e Souza (Malba Tahan), kiu estis ankaŭ esperantisto kaj ŝatata preleganto pri Esperanto.

J. B. Mello e Souza estis entuziasma skoltestro kaj prezidis la "Brazilan Federacion de Skoltistoj". Li estis fakdelegito pri skoltismo.

De 1906 ĝis 1825 li laboris ĉe Ministerio de Internaj Aferoj kaj Justeco kaj uzis sian prestiĝon por ke Brazilo estu reprezentata en diversaj E. Kongresoj. Li estis membro de Beletristika Akademio de Rio de Janeiro, kaj de Brazila Societo de Geografio.

Kiel redaktoro de la grava ĵurnalo "O Imparcial" li uzis la pseudônimon "J. Meluza". Li estis poeto kaj romanisto kaj aŭtoro de libroj por infanoj. Li lasis vastan verkaron pri historio kaj pri siaj rememoroj.

J. B. Mello e Souza estis neforgesebla esperantisto kiu multege laboris por disvastigi la lingvon kaj la belan idealon de Esperanto inter la brazilanoj. Gloron kaj dankon al li!

Alberto Flores





## AMIKOJ DE NIA ELDONEJO

Alberto Flores kun la edzino Clecy Zamora kaj la filino Maria Carmen.

La brazila inĝeniero Alberto Flores estas tre kara frato de nia Eldonejo, aktiva kunlaboranto de Almanako Lorenz kaj Komunikoj.

Dankon pro ĉio, kara Amiko!




Jen tre interesa libro enhavanta diversajn lumajn mesaĝojn de la Spirito Joana de Ângelis per la mediumeco de Divaldo Pereira Franco.

Joana kunigis tiujn paĝojn, konsistigantajn la libron, kiun ŝi nomas "Lumo de l' Espero", por ke ili helpu tiujn, kiuj troviĝas en la ombroj de malekvilibro, ekvidantaj la elirvojon direkte al harmonio, samtempe proponante stimulojn kaj fortojn, kiuj malhelpos la malfeliĉajn kompromisojn kun la frenezeco kaj la suicido. Ili estas studoj, kiuj jesigas la bonegecon de la penso de Jesuo, instigante al vivado en amo. Lumo de l' Espero neniam povos estingiĝi en la homaj mensoj nek en la homaj koroj,

Ĉi-tiun veran trezoron, karaj legantoj, ni sendos al vi, tute senpage. Sufiĉas nur sendi vian adreson.

La oferto validas nur por eksterlandaj samideanoj.

LORENZ

**SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ**
Rua dos Inválidos, n. 34, grupo 903
Caixa Postal 3133 - CEP 20001-970
Rio de Janeiro (Brasil)
Tel. (21) **2221-2269** <editora_lorenz@uol.com.br>

**www.editoralorenz.com**




Al Sinjoro M-n en G.

Via letero estas subskribita: "Unu el la plej varmaj amikoj de la lingvo Esperanto"! Mi efektive memoras, ke de tempo al tempo vi sendas al mi leteron kun demandoj pri la irado de la afero; sed neniam ankoraŭ Vi skribis al mi kion Vi Mem faris por nia afero. Varma amiko de nia afero povas sin nomi ne tiu kiu ĉiam demandas, sed nur tiu kiu laboras por nia afero kaj vastigas ĝin. Anstataŭ demandi min ĉiumonate "kio estis farita", Vi devas en la fino de ĉiu monato demandi Vin Mem: "kion mi faris por nia afero en la lasta monato?"

L. Z .

Dom Feliciano, R. G. do Sul, la 17an de Aŭgusto 1942

Tre estimata Amiko kaj Samideano,

Srº Ismael Gomes Braga:

Saluton kaj Pacon!

Ricevinte antaŭ du tagoj Vian ŝatindan leteron el la 27/7, mi reviziis el la senditaj folioj la unuan duonon (paĝojn 164-190), kaj ĉikune mi ilin resendas.

Neniam dum la lastaj monatoj mi estis tiom okupata, kiel nun; la lernejo kaj la malsano de mia edzino ne lasas al mi liberajn horojn, laŭ mia deziro; tial mi estas kontenta ke la ellaboro de "Espº sem mestre" ne urĝas.

Nun alproksimiĝas la "Semajno de la Patrujo", kiu postulas novajn lernejlaborojn. Mi konstatas ke miaj fortoj malpliiĝas; hodiaŭ ne parolinte senpaŭze unu kaj duonan horojn en la lernejo, venis hejmen tre malfortiĝinta. Kaj mia edzino, kvankan iom plissana, daŭros havi malbonajn noktojn. Dio volu ke la printempo alvenu kaj plibonigu la situacion.

Pri la "Curiosidades Lingüísticas", mi ne plu pensas. Mi scias ke dum la monda milito ĝi ne povos esti publikigita. Oni plendas ĉie pri la manko de papero. Eĉ la ŝtata taga ĵurnalo de ĉi tiu ŝtato ĉesis la eldonadon pro tiu manko.

Ni atendu pli bonajn tempojn, ĉar post malbono devas veni Bono.

Vin kaj Vian ŝatindan familion kore salutante, mi deziras al Vi kaj al la Viajn ĉion bonan.

Via frato,


Lorenz

# • • • • LANĈOJ DE LORENZ • • • •





**POŜA VORTARO**
**VOCABULÁRIO DE BOLSO**
(du libroj en unu – Du-lingve)

**R$15,00**




**RECADOS DE BEZERRA E ALCIDES**

**R$22,00**




**ALMANAKO LORENZ 2010**

**R$15,00**

Acima de 5 exemplares = R$ 10,00 (cada)
Acima de 10 exemplares = R$ 7,00 (cada)
Acima de 15 exemplares = R$ 5,00 (cada)
Acima de 20 exemplares = R$ 4,00 (cada)



Jen tre aktiva Esperantista Grupo de Pedro Leopoldo kaj Matozinhos en la Ŝtato Minas Gerais, Brazilo, kies instruisto kaj gvidanto, Alberto Luiz Minardi Chueri, gvidas elementan kaj paroligan kursojn.

Se vi interesiĝos korespondi kun la Grupo, skribu al

esperantistagrupo@bol.com.br

Gelernantoj kaj instruisto. Alberto estas la barbulo.

## ĈU VI JAM REKOTIZIS POR 2010?

Ne perdu tempon. Aliĝu tuj kaj ricevu, en la komforto de via hejmo, du librojn, Almanakon Lorenz kaj nian trimonatan bultenon.

Koran dankon!

editora_lorenz@uol.com.br
Tel.: (21) **2221-2269**